PILO-PRESS
Internacia Informservo
N-ro 42/77 - 27 okt 1977
Aperas ĉiusemajne

Reaperis la lernolibro de Wingen "Wir lernen Esperanto"
Prezo 9,80 DM
Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

## Pri informa agado

München (pp) - Josef Weidacher estas la motoro de la nuntempa informa agado de la Esperanto-Klubo München. Subtenas lin kelkaj junaj kunlaborantoj, speciale Friedrich Hilpert, la kluba kasisto.

Kiel ĉefan taskon la Munkenaj agantoj konsideras la informadon pri la Internacia Lingvo Esperanto al la publiko. Tiucele oni regule aranĝas informstandojn en la urbocentro disdonante prospektojn kaj flugfoliojn kaj ekspoziciojn, por kiuj Josef Weidacher preparis kaj kolektis taŭgan materialon.

La ĉi-jara Esperanto-ekspozicio, okazinta la 15-an kaj 16-an de oktobro kun informvespero la 17-an de oktobro, distingiĝis de la antaŭjaraj: Fakte venis iomete malpli da vizitantoj(ĉ. 120), sed ĉeestis pli da seriozaj interesuloj. Inter 15 kaj 20 personoj, ĉefe junaj, fakte decidiĝis lerni Esperanton kaj parte jam en la ekspoziciejo aĉetis lernilojn. La plej multaj el ili elektis la vojon de memlernado, parte laŭ de Libroservo Ludwig Pickel, kiu ĉeestis la ekspozicion, proponita ebleco.

Kelkaj el tiuj interesuloj jam antaŭe havis iel kontakton al Esperanto kaj eksciis pri la ekspozicio el diversaj fontoj. Unu ekz. petis informojn pri Esperanto de Esperanto-Centro Nürnberg jam antaŭ 10 jaroj, alia informiĝis el televido, trian instigis al lernado la poŝlibro de R. Schulz "Mia amata Esperanto". (Cetere laŭ niaj konstatoj tiu libro influis jam multajn homojn pozitive por Esperanto!)

Sekve de la ekspozicio venis al Nürnberg ankaŭ kelkaj skribaj mendoj al lerniloj kaj du lernantoj novaj jam ensendis siajn unuajn taskojn por korektado.

Estas certe, ke sekve de la ekspozicio fariĝos kelkaj novaj esperantistoj, kiel tio jam okazis en antaŭaj ekspozicioj.

### Nia komentario

Regas ie kaj tie, speciale en sciencistaj rondoj, la opinio, ke la vorto "Esperanto" povus malhelpi Esperanton, ke la vorto "Esperanto" povus ridindigi la Internacian Lingvon kaj ĝiajn parolantojn. Pro tio oni re-enkondukis la esprimon "planlingvo" aŭ uzas nur la esprimon "Internacia Lingvo".

Laŭ nia opinio ne iu vorto aŭ nocio ridindigas iun ideon aŭ aferon sed la konduto de la homoj, kiuj ne kapablas serioze kaj adekvate prezenti al la publiko tiun ideon aŭ aferon.

Same ni opinias, ke informado kaj varbado sole ne garantias sukceson al Esperanto. Gravas ankaŭ la kulturado de la lingvo, la kreado de kulturaj valoroj en Esperanto.

Esperanto eniĝis la publikon, ĝi havas tradicion. Tio manifestiĝis la 20.10.77 dum kvizo en la Dua Germana Televido, kiam la kvizmastro Wim Thoelke legis kelkajn frazojn el la Esperanto-traduko de Struvelpetro kaj demandis la kandidatinon pri la aŭdita lingvo. Kaj la respondo estis: Esperanto.

Ĉ. 20 milionoj da homoj rigardis la televidan elsendon kaj aŭdis Esperanton. Kaj la pozitiva komento mallonga fare de Wim Thoelke pri la Esperanto-literaturo certe favore influis la publikon.

El la urbo de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto

Boulogne-sur-mer (pp) - Sekve de parolado de s-ro Robert Soudant en Boulogne ĉe maro la 27-an de oktobro 1976, patronite de la urbestraro, kurso malfermiĝis en la urba kunvenejo. Ĉi-jare du Esperanto-kursoj funkcias, unua- kaj duagrada. Jam Bulonjaj esperantistoj povas inter-rilati kun samideanoj el Gdansk, Pollando, ĝemeliĝinta kun ilia urbo.

Prizorgas la kursojn s-ro Lamouche, diplomito de la lingvo, kaj s-ino Liné, edzino de la vicurbestro (34, Rue de Beaurepaire, F-62200 Boulogne-sur Mer).

Novaĵoj el Berlino

Berlin (okcidenta) (pp) - Fondiĝis Universitata Esperanto-Grupo ĉe la Teknika Universitato de Berlin sub gvido de Jürgen Bastert. La grupo havas 17 membrojn; 13 el ili estas samtempe membroj de la Esperanto-Ligo Berlin.

30 infanoj de lernejo en la 4-a ŝtupo lernas dum unu jaro Esperanton laŭ la Paderborna modelo. Instruisto estas Hermann D. Tautorat. La instruado okazas kadre de la lerneja programo kaj estas pagata.

Pri aliaj universitataj grupoj

Bonn/ Würzburg (pp) - Universitataj Esperanto-grupoj funkcias ankaŭ en Bonn kaj Würzburg.

Laŭ artikolo en "Generalanzeiger", Bonn, de la 19.10.77 la grupo de Bonn sub gvido de Hartmut Trunte invitis al informvespero la 24-an de oktobro. La intencitan kurson por komencantoj gvidos la hinda studento Yashovardhan.

La grupo de Würzburg, sub gvido de Otto Gessner, komencis kurson por komencantoj la 20-an de oktobro.

Skiferio en Adelboden

La Chaux-de-Fonds (pp) - Por la 21-a fojo disvolviĝos de la 26-a de decembro 1977 ĝis la 5-a de januaro 1978 la nun tradicia Esperantista Skiferio en Adelboden (fama skiparadizo en Svsilando). Estos loko en la ĉaledo, kie ĉiuj helpas al la dommastrumado, por 25 esperantistoj nekrokodilaj kaj sportemaj.

El la programo: skiado en grupoj; glitŝuado; ski-instruado por komencantoj; komunaj ekskursoj; vesperoj kun prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj, ktp. Partoprenkotizo: Gelernantoj, studentoj: 260 sv. fr., aliaj partoprenantoj: 310 fr. Petu la detalan informilon de Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

**********************

Por germanlingvanoj

Ĵus reaperis **Wir lernen Esperanto + Schlüssel**
(en unu volumo - in einem Band)

Fotorepreso de Sarlanda Esperanto-Ligo — Prezo 9,80 DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113
D-8500 Nürnberg 1, PSchK Nürnberg 819 56-851

Krome haveblas jenaj germanlingvaj informiloj:

Internationale Sprache Esperanto, 8-paĝa, DIN A 5

10 ekz. 3,- DM, 50 ekz. 12,50 DM; 100 ekz. 21,- DM

Esperanto-Sprachübersicht in Kürze, 8-paĝa, DIN A 5

10 ekz. 3,- DM, 50 ekz. 12,50 DM; 100 ekz. 21,- DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

Esperanto en Radio

Terorismo ankaŭ ĉi-semajne estis temo en Esperanto-elsendoj.

Radio Vatikana raportis pri la preteco de la papo anstataŭi la garantiulojn en la aviadilo de Lufthansa. En la pluaj informoj de la elsendo oni ekscis pri la respondo al la gratultelegramo de la Esperanto-redakcio okaze de la naskiĝtago de la Sankta Patro kaj pri la Apostola Beno donita al la redakcianoj kaj aŭskultantoj de la Esperanto-elsendoj. La"liturgia penso" de pastro Jacobitti traktis la parabolon pri la fariseo kaj impostisto.

Pola Radio. El la pasintdimanĉa "Panoramo de internaciaj eventoj" ni ni citas:

"La lastaj eventoj, forkonduko de la aviadilo de "Lufthansa", besteca murdo de Schleyer, multiĝantaj teroragoj en la landoj de la okcidenta Eŭropo kaj precipe en F R Germanujo elvokas profundan maltrankviliĝon de la internacia opinio. Kreskanta terorondo formas endanĝerigon por la homoj en la tuta mondo. Kontraŭagi terorismon oni povas sole rezulte de la solidara internacia kampanjo.

La socialismaj landoj plurfoje elpaŝis kun iniciatoj ĉi-koncerne. Hodiaŭ la problemo de la internacia kunagado fariĝas la principa problemo en la batalado kontraŭ terorismon. Tamen tio devas esti kampanjo konsekventa sen aplikado de diversaj mezuroj rilate la forkondukintojn se ĝi estu efika. Ĉar oni ne povas paroli pri la efika batalado kontraŭ terorismon se oni kondamnas teroragojn kaj kun rekono bonvenigas, kiel faras ĉi tion plurfoje la burĝa gazetaro en okcidento, agadojn de armita teroro rilate ekzemple aviadilojn de la socialismaj ŝtatoj.

La teroro estas tia malkongrua kun la elementaj principoj de la humaneco. Grandan intensiĝon de la agado de la teroristoj kaj anarkistaj grupiĝoj oni notas lastatempe en F R Germanujo. Preskaŭ ne estas tago sen forkonduko de influpovaj personuloj, murdado de senkulpaj homoj, incendioj kaj rabadoj. Tio vekas apartan maltrankviliĝon de la pola, sed ne nur pola, publika opinio, vekas la plej mornajn rememorojn de Hitlerismo........"

ORF Wien. Ankaŭ la semajna komentario de d-ro Alfred Macher okupis sin pri terorismo. Ĝi tekstas:

"La ekstrem-maldekstruloj ekkonis, evidente, ke ĝuste la laboristaro, kiun ili volas liberigi - oni ja ne scias, de kio ? - abomenas la tiom kreskegintan terorismon; kaj pro tiu seniluziiĝo ili furiozas per anarĥiaj detruoj de germanaj institucioj en ankaŭ Italio, Greklando, Francio kaj Belgio.
Multaj landoj, kiuj restis indiferentaj fronte al la terorismo - kelkaj eĉ donis rifuĝejon al la aer-piratoj - estas nun, kiel la tuta mondo, finfine vekitaj. Ĉiuj komencas kune serĉi la gekrimulojn.

La aŭstriano Kurt Waldheim, sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj (UNO), provis traktigi en la ĝeneralkunveno la proponon pri universala interkonsento kontraŭ la forkaptado de garantiuloj. Vane - pro rifuzo flanke de la arabaj delegitoj.

Nun la aŭstria delegitaro ĉe la Unuiĝintaj Nacioj proponas rezolucion, kiu kondamnas ĉiun perforton kontraŭ aviadilaj personaro kaj pasaĝeroj. Plie ĝi urĝas, ke ĉiuj ŝtatoj kunlaboradu, sekurigante la aertrafikon kaj interŝanĝante informojn.

La propono evitas la vorton "teroristoj", ĉar tiu vorto ja malplaĉas al la araboj. Sed estas egale, ĉu oni nomu la krimulojn "teroristoj" aŭ ĉu ne - gravas nur, ke oni ekagu kontraŭ ili komune."

Citaĵo el letero de aŭskultanto: "Ĵus mi aŭdis vian elsendon...mi gratulas pro la bona elparolo...Estas pli bone dissendi malpli kaj komprenigi ĉion, ol dissendi pli kaj komprenigi malpli. Do, gratulon pro via bona vortumo! Fernando Zacchè, Mantova, Italio."

Abonu aŭ reabonu

La ĉinan monatan gazeton en Esperanto

# El Popola Ĉinio

1. Periodo de la 1978-a abonvarba kampanjo:

   de la 1-a de novembro 1977 ĝis la 28-a de februaro 1978

   Novaj aŭ renovigaj abonantoj, kiuj faris siajn abonojn en la perido, povos senpage ricevi ekzempleron de grandformata kalendaro de 1978 kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj.

2. **Abonprezo:**

| | |
|---|---|
| 1 jaro | DM 6,— |
| 2 jaroj | DM 9,— |
| 3 jaroj | DM 12,— |

3. Estu abon-varbantoj de EPĈ, sekve vi ricevos el Ĉinio memoraĵojn kun ĉina stilo.

   Loka peranto:

   **S-ro Ludwig Pickel**
   **Postfach 2113**
   **8500 Nürnberg 1**
   **Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56 - 851**

Ĝenerala distribuanto:

Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

**Specimeno akirebla senpage laŭ peto.**

Radio Roma

Kampanjo por ŝanĝo de la elsendotempo

Laŭ ricevitaj informoj Esperanto jam okupas unu el la ĉefaj lokoj en la statistiko de Radio Roma; verŝajne, do, venis la tempo organizi kampanjon ĉe la esperantistoj, por ke ili petu pli bonan taksadon de la Esperanto-elsendo. La ĉefaj postuloj estas tri: evito de la samtempeco kun Vatikana Radio, ŝanĝo de horo aŭ tago aŭ frekvencoj kaj ripetado de la elsendo, eldonado de program-broŝuro ankaŭ en Esperanto aŭ almenaŭ kun resumo en Esperanto. De kelka tempo, la Esperanto-redakcio tradukas la alvenantajn korespondaĵojn por la radiaj kaj registaraj instancoj, do la deziroj estas priekzamenataj. Aparte gravaj estos la petoj, kiuj venos el landoj, kie oni ne parolas la lingvojn jam uzatajn de Radio Roma en siaj publikaĵoj, kaj el ekster-eŭropo. Oni memoru, ke por statistikoj ne gravas, kion oni skribas (ankaŭ plendoj pri ne-aŭdebleco estas taŭgaj), sufiĉas, ke oni montru intereson ekaŭdi Radion Roman en Esperanto kaj ekscii pri la itala vivo pere de la internacia lingvo! Do, ni ekagu kaj skribu al: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio.

Radio Vatikana, Esperanto-Redakcio, skribas: Dimanĉe, la 16-an de ĉi tiu monato, ni menciis vian simpatian bultenon dum nia Esperanta disaŭdigo. Ni estas feliĉaj koninte vian bultenon kaj aboninte ĝin, kaj ni gratulas vin pro ĝia realigo. 17.10.77/2098 Radio Vatikana, Esperanto-Redakcio
Piazza Pia 3, I-00193 Roma